

PENSEO

N-ro 258

aprilo / 2013

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 24-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



Eta grando

la liva mano mortigas la dekstran
kiel batalas tigo kontraŭ tigo.
luinte flagon lupan, vulpoj venas;
la leono testude manĝas sian inteston.



Amo perdita

ankoraŭ junaj la knabino kaj la knabo?
de tridek jaroj klaras la kolomboj kun ridetoj.
vento atendas, kiam la mastroj poŝte ricevos
ŝipojn da rakontoj duonlunaj.



La fino de kulto al violento

arbo el greftado loĝas en alies nesto.
la branĉoj sin etendas tra pordoj por ĝui
ostojn de herbetoj instigite intermordaj.
bruligo per blovo la trunkon cindrigas.

Jadranka Miric (Serbujo)



Januara kanto

Tage kaj nokte, tuta
arbaŭ ĝoje muĝas al neĝo muta.
Faladu neĝeroj neĝaj.
Faladu neĝeroj blankaj kaj teneraj.

Neĝeroj kovris
la tutan altaĵon nian.
Bonvenon, krias ni.
La Unua neĝo, estas vi!

Neĝeroj kovris
vilaĝon kaj urbon.
Bonvenon! krias ni
Neĝhomo, bonvenon, al ni.!

Ekaudiĝas krioj, ridoj kaj bruoj gaja.
Sur skioj Tomo, sur sleĝoj Maja.
Loĝantoj novaj sur la glacia lago.
La Glitejon malfemas Iva kaj Zago.



Jadranka Miric (Serbujo)



Dum malhelaj noktoj

Pluva nokto malhelas.
Tuta urbo pace dormas.
Stratlume kiel lampo alkroĉita,

via dormanta vizaĝo estas lumigita.
 Dormu senzorge, filo mia
 delonge gardas vin panjo via.
 Dum nokta pluva tamburado
 audiĝas mallaŭta panja kantado



Leieladonna (Meksikio)



Diamantaj pintoj

oni verkas rimon kaj prozon
 per diamantaj pintoj
 de rara kvalito...
 nur poetoj povas fari ilin,
 neniuj plu...

Mi klarigas al vi:

Ili devas esti frenezaj,
 iri de larmoj al ridado subite
 kaj ridado al larmoj akre
 ami intense, freneze,
 negrave se oni amos aŭ malamos ilin.

havi koron kiu pulsas multe,
 forte aŭ malforte, ne gravas eĉ...
 se kelkfoje preskaŭ ĉesas, kaj tiam kuras...
 sed amas kaj malamas intense.

Por atingi tiun tipon el diamanto
 devos funebri larmoj el sango
 senti ĝishaŭte kaj ĝisoste
 la doloron, la ĝojon, la fascinon...

Kaj estas armiloj kiuj vin blindigas
 pro multa funebrado pro tio...
 kiu donis al ni multan ĝojon,
 kiu donis al ni multan ploron...

Zorge verku...
 per diamantaj pintoj...

en malzorgo kaj ili tre dolorigas,
 atingas mortigi tiel facile,
 detruas vin momentete...
 estas tiel maldikaj... kiel fortaj...
 samsangas paperon, animon kaj menson.

sentimentalaj nekongruoj el malsaĝuloj,
 nekongruaj frenezuloj kun sango en iliaj
 okuloj,

kun sango sur ilia brusto, kaj en manoj...
 ili finas kun ŝiritaj vestoj
 kaj kun kajero en strioj...
 sufokitaj per larmoj.

Estas tiuj frenezaj poetoj amante,
 suferante, ĝemante, ĝuante,
 frenezuloj perditaj digresie sencele,
 bezonante iun manon,
 iun amikon...

Kun la sola espero ripozi
 por atingi revante
 tiel dista stelo,
 tiel hela, kiel dezirata.


Prenos eternecojn ilin fari,
 kaj oni ne bezonas rigardi eksteren,
 diamantaj pintoj estas el larmoj,
 el frostigitaj larmoj per malvarmo de la animo.

En mildaj sonĝoj
 Leieladonna rev'
 plena de floroj.

pace sen bruoj
 birdoj kaj papilioj
 nur melodias.

Dum korpo dormas
 eterne sen vekigi

anim' liberas.



Paŭlo Silas (Brazilo)



ENE DE VI MEM

Dormema korpo sub influfero de lunklaro
Okulmezuris vivdecidan vojkruciĝon.
Ĉu obead' al momentaj moroj, al Normalo;
Taŭgigi pensojn, sed alfronti malfeliĉon?

Aŭ teksti isman klarigon ekster l' Ordinaro?
Heroe levi flagon cele al prestiĝo,
Sur kiu estos kuŝanta nova aktualo?
Ĉu oni tiam fine trovos la feliĉon?

Ho, martira sorto sub estiĝonta sunlumo,
Ve! klopodoj viaj: nur apenaŭa akvumo
Al la tigo kiu pretendas iĝi la sekvojo.

Ĉu konkeri mondon? Eĉ ankaŭ Sunsistemon?
Vi fermiĝis ĉirkaŭ vi, amis vian memon;
Kaj malsane revas, ke baldaŭ venkos Laktan
Vojon.



Mori (Usono)



Miskompreno

1.

Kun fremduloj
el foraj landoj

mi komunikas tre bone
per Esperanto!

Sed per kiu lingvo
magia
Mi komprenu
samlingvajn
fremdulojn !?

2.

Inter miaj gemikoj
mi sentas min fremda
kulpas nek ili nek mi
sed muro plej fortika
staranta inter ni
muro de miskompreno!

Amikoj venu kune
ni detruu la muron!



Cezar (Germanujo)



Esperanto survoje

Esperanto sur la vojo
jam ensorĉas, estas ĝojo,
brilas kiel stel' aŭ Luno,
kiel blanka mev' sub Suno!

Esperanto meve flugas,
nubokampojn gaje plugas,
tute freŝan venton spiras;
Esperanto min inspiras.

Esperanto sur la vojo,
estis mia trov' de Trojo.
Mi ne serĉis tute vane,

prenis lingvo min ĉemane.

Esperanto semokorta
 faras min espere forta.
 Sur la voj' Esperantio
 nutras min per pacvizio.



Petro Palivoda (Ukrainio)

Leontodo

nenio okazis en mondo
 pereis nur leontodo
 traktoro per radoj multpezaj
 ĝin premis al tero senbate
 mi vidis paraŝuteton
 ĝi longe ne falis surteren



Kompreno

Mi komprenas:
 Tero estas globo,
 duoble du faras kvar,
 vintre estas tago plej mallonga,
 estas plej varme somere.
 Kiel multe mi komprenas!
 Kiel malmulte mi komprenas...

Miraklo

Dezirus mi kredi miraklon.
 Rekte en flakon telero falas,
 kaj krias aliplanedanoj:
 Tio ne estis antaŭvidita.
 En lago kaptita estas
 lacertelefanthibrido.
 Intervjuata estas neĝhomo
 De raportistoj el CNN.
 Dezirus mi kredi miraklon,
 En mondo ankoraŭ okazas mirakloj.
 Ree vi min preterpasas.
 Kiel al mi jam tedis
 ĉiuj ĵurnalsensacioj!..



Siv Burell (Svedio)



Utopio

Dormu, dormu, amiket'
 jen vekinta post tempet'
 tuta mondo ŝanĝis
 For estas militem'
 for tromp' kaj intrigem'
 kaj lingvouz' tutŝanĝis

Fremda certe ne la sent'
 en iu land' en mondo
 alparol' amika tent'
 al sama lingva fondo
 Foriĝas do la ni kaj vi
 ni ĉiuj estos ni
 kaj veras nia utopi'

Blazio VAHA (Hungarujo)



Ĉi versoj diros ja nenion

Ĉi versoj diros ja nenion.
Sed kial volas vi alion?
Jen vorto sekvas vorton: spiras
la lingvo - kaj ĝi, viva, iras.



Mü Chongqun (1907-1945)

Lito el floroj

Vintre, la suno malofte vidiĝis en tiu loko, ĉirkaŭita de montoj. Feliĉe, la nebulo estis tiel maldensa tiun tagon ke orkoloraj sunradioj amuziĝis en la aero. Kaj ŝajnis, ke la tero estis gajigita de tiu ĉarma koloro.

Elirinte el la malhela mansardo, kiu servis al mi kiel laborejo kaj kie mi enfermis min dum la tuta jaro, mi levis la kapon kaj etendis la brakojn kvazaŭ mi volus forte brakumi iun. Laŭ vojeto mi malrapide venis en novan vilaĝon, kvietan kaj elegantan kiel belan ĝardenon. Sed la vilaoj ŝajnis dormantaj kun fenestrokurtenoj mallevitaj kaj ekran-pordoj ŝlositaj. Ne kutimiĝantaj al la malvarma kaj monotona vivo en la sovaĝejo, la riĉuloj kredeble rifuĝis vintre en movoplenan urbon, mi supozis.

Mi haltis sur ligna ponteto por rigardi de malproksime verdetan monton. Herboj ja velkis kaj restis nur tritiko apenaŭ kreskinta, kiu okupis tiun vintran teron.

Estis kiam mi sentis bonan odoron venintan de ie, ke mi rimarkis, turninte la kapon, malgrandan deklivon surŝutitan per floretoj kiel oraj moneroj. Eble ili estis junaj krizantemoj frostorezistaj. Ŝajnis al mi, ke ili flustre interparolis kaj divenis, kion mi venis fari tie.

Mi klinis la kapon kaj vidis mian ombron kuŝanta sur la tero. Kiel mi volus kuŝi sur tiuj floretoj kvietaj kaj aromaj, kiuj faris sin natura aminda lito! Ĉu estis varmete sub la tero, malgraŭ en vintro?

Vintre, ĉu la tero tre malproksima, kie oni enterigis mian amatan edzinon, estas kovrita sole per velkaj herboj aŭ pompas floroj nekonataj, kiuj faris por ŝi komfortan liton? Mi certiĝis, ke la loko, kie oni enterigis la amon, entenas varmecon.

Lasu min silente versi larmojn sur la liton el floroj. Iun tagon, ankaŭ mi trankvile ripozos por ĉiam, sub la lito, kie certe estas varme. Ŝajnis, ke mi venis ĉi tien por serĉi ion, kion tamen mi ne retrovos plu, krom ke ankaŭ mi dormus sub la lito el floroj, en subtera mondo, kie murmurus certe dolĉa rivereto de amo.

10-12-1941



Elĉinigis



Lihua Wang (Ĉinujo)

Pablo Neruda (1904-1973)



Blanka abelo, ĉi zumas...

Blanka abel' ĉi zumas,
ebria pro miel', en mia animo
kaj ĉi baraktas en lozaj spiraloj de l' fum'.

Mi estas la senespera, la vorto sen reekoj,
tiu, kiu ĉion perdis kaj tiu, kiu ĉion havis.
Lasta ŝnuro, knaras ene de vi mia anksieco
lasta.

En mia dezerta tero ci estas la lasta rozo.

Ha silentema!

Fermu viajn okulojn profundajn. Tie ŝvebas la
nokto.

Ha, nudigu vian korpon de statuo timema.

Ci posedas okulojn profundajn, kie la nokto
ŝvebas.

Freŝajn brakojn de floro kaj sinon de rozo.

Viaj mamoj similas al la konkoj blankaj.
Sur vian ventron venis dormi la papili' de
ombro.

Ha silentema!

Jen la soleco el kie ci malestas.
Pluvas. La vento de la maro forpelas mevojn
vagabondajn.

La akvo paŝas nudpiede tra stratoj malsekaj.
De el tiu arbo ĝemas kvazaŭ malsanaj, la
folioj.

Blanka abelo, malesta, ankoraŭ ci zumas en
mia animo.
En la tempo ci revivas, delikata silentema.

Ha silentema!



Esperantigis



Helena Tylipska
(Italujo)

Leontodo aŭtuna

Se vi atendos,
venos la printempo,
en kiu pompaj papilioj kaj abeloj
ne mankos.
Sed kial ne hodiaŭ?
Se vi hodiaŭ
ekflori povas.
Ĉe falintaj folioj
ekfloris la leontodo
kiel fremdulo en dezerta herbejo.
Ĝin vizitis la subiranta suno,
kies ruĝa radio tenere karesas
timoplenajn flavajn petalojn.
Alvenis en ĝi diversaj insektetoj, kiuj
ekfaldas siajn flugiletojn.
Do, kial ne nun?
Se vi nun
ekflori povas.



elkoreigis



Song Jeong-ok (Germanujo)

12.11.2012

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Senlinna patrino

omaĝe al la Virina Tago 2013

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

patrin-am'
 vastas kiel mar'
 grandanima al ĉiuj
 honesta kun blua klar'
 dona sen avar'

patrin-am'
 kun sorĉa forto
 flegas idojn zorgeme
 silentema sen vorto
 de viv' ĝis morto

patrin-am' —
 bona kuraco
 jen por vunditaj koroj
 disde ĝena minaco
 igas sen laco

patrin-am'
 vokas per altir'
 murmure kaj intime
 la gefilojn en sopir'
 por rehejmenir'

patrin-am' —
 eternas la tem'
 por poetoj, verkistoj
 — por menso la nutra krem'
 la bela poem'

**Sopir-al-sudo: ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima)*

Guozhu (Ĉinujo)



Nebulozo

—laŭ ĉinesko Qinyuanchun*

Nun rigardu
 al Pekino
 nebulplena.
 Tro ofte dronas
 la ĉefurbo
 de Ĉinio

en venena
 nebulozo,
 kiu kovras
 ĉion polvokurtena.
 Birdnesto
 Siluetiĝas
 bild' ĉagrena.



En angul' ĝardena
 Gimnastas
 en hor' matena
 tamen ankoraŭ
 mort-spitantoj
 en aero
 abomena.
 Belulinoj
 konkure sin
 ŝirmas per masko ĝena.
 Retanoj
 versas pastiĉon
 nur malbena.

**Qinyuanchun (Printempo en la ĝardeno Qin): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 13 versoj de 444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ rimaranĝo .xxa,xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxa,xxa,xxa (x = senrima)*

Eto (Ĉinujo)

Al surreta ŝi

—laŭ ĉinesko Shuilongyin*

Nesaveble falas
 mi en amon de angor'.
 Mi murmuris,
 mi deliras
 en ĉiu hor'.
 Mi ne manĝas

mi nek dormas
kun kordolor’.
Mi diris al ŝi
ke mi kovas
la amon
en la kor’.

Ŝi snufis per ignor’
dirante
“Aha, sinjor’,
mi neniam
tian senton
en la memor’
de via am’,
sed babilon
de korfavor’!”
Kia inaĉo!
Ho ve, mia
amo, for, for!

**Shuilongyin (Akva drako): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 12 versoj de 67,444,444,5433 / 6,34,444,444,544 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, xxa, xxa, xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x= senrima)*

Persikfloroj pompas

—laŭ ĉinesko Shuidiaogetou*
Kovranta l’ monton
ruĝeta kolor’
impresas tre bele.
Je matena hor’
jam multaj turistoj
paŝas inter arboj
ŝmac-laŭdas en ĥor’
envolvate de
aroma odor’.

Abeloj
rondflugas
en labor’
diligente
kolektante kun fervor’
polenon de floroj.
Homoj kaj abeloj

en ruĝeta glor’
ja interagas
kun sincera kor’.

**Shuidiaogetou (Preludo de akva melodio): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj laŭ rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa (x = senrima)*

Lily (Ĉinujo)

Rendevuo sub persikarbo

—laŭ ĉinesko Tasuoxing*
sub persikarb’
la rendevu’
kunligas nin per seks-ĝu’
ni kveras, smaĉe kisas
dronas en pasia sku’

li kaptas min
je la genu’
eniras min tra la tru’
mi ĝemkrias senĉese
orgasm’ jam venkas nin du

**Tasuoxing (Paŝo sur herbo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 44,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa,a,xa (x=senrima)*

Maupassant (1850-1893)



LA ERMITO

Ni ĵus iris vidi, kun kelkaj amikoj, la maljunan ermiton kiu vivas sur malnova tumulo kovrita de grandaj arboj, meze de la vasta ebenajo, kiu etendiĝas inter Cannes kaj Napoule.

Revenante, ni parolis pri tiuj strangaj laikaj soluloj, multnombraj antaŭe, kaj kies nun raso malaperas. Ni serĉis la moralajn

kaŭzojn, ni klopodis determini la naturon de la afliktoj, kiuj antaŭlonge puŝis la homojn en la solecon.

Subite unu el niaj kunirantoj diris:

– Mi konis du gesolulojn. La virino devas esti ankoraŭ vivanta. Ŝi loĝis, antaŭ kvin jaroj, en ruino sur la kulmino de monto absolute senhoma sur la Korsika marbordo, je dek kvin aŭ dudek kilometroj de iu ajn domo. Ŝi vivis tie for kun servistino; mi iris vidi ŝin. Ŝi verŝajne estis distingita mondumanino. Ŝi akceptis min kun ĝentileco kaj eĉ kun certa bona gracieco, sed pri ŝi nenion mi scias; nenion mi divenis.

"Pri la viro, mi tuj rakontos al vi lian sinistran aventuron:

Rigardu returne. Vi ekvidas, tie for, tiun pintan kaj arbaran monton, kiu reliefas malantaŭ Napoule, tute sola antaŭ la kulminoj de la montaro Esterel; en la lando oni nomas ĝin la monto de la Serpentoj. Mia solulo vivis tie for, en la muroj de antikva malgranda templo, antaŭ ĉirkaŭ dek du jaroj.

Aŭdinte paroli pri li, mi decidiĝis fari lian konon, kaj iun matenon de marto, surĉevale mi rajde foriris de Cannes. Lasante mian beston ĉe la gastejo de Napoule, mi piede ekgrimpis tiun bizaran konuson, altan eble je cent kvindek aŭ ducent metroj, kaj kovritan de aromaj plantoj, ĉefe cistoj, kies odoro estas tiel vigla kaj tiel akra, ke ĝi ĝenas kaj malsanetigas. La grundo estas ŝtonplena, kaj ofte oni vidas gliti, sur la ŝtonetoj, longajn kolubrojn, kiuj malaperas en la herbojn. Pro tio, tiu kromnomo, ja meritita de monto de la Serpentoj. Iujn tagojn, la reptilioj ŝajnas naskiĝi sub viaj piedoj, kiam oni grimpas la alsunan deklivon. Ili estas tiom multnombraj, ke ni preskaŭ ne aŭdacas marŝi, kaj ni sentas bizaran ĝenon, ne timon, ĉar tiuj bestoj estas sendanĝeraj, sed iun specon de mistika timego. Mi plurfoje travivis la strangan senton grimpi malprofanan antikvecan monton, bizaran monteton, parfumitan kaj misteran, kovritan

de cistoj, loĝatan de serpentoj, kaj kronitan per templo.

Tiu templo ankoraŭ ekzistas. Almenaŭ oni asertis al mi, ke temis pri templo. Ĉar neniam mi serĉis pli scii, por ne difekti miajn emociojn.

Do, iun martan matenon, mi grimpis sur tiun monteton, pretekste, ke mi tuj admiros la pejzaĝon. Alveninte ĉe la kulmino, fakte mi ekvidis murojn, kaj sidantan sur ŝtono, viron. Li aĝis apenaŭ pli de kvardek kvin jaroj, kvankam liaj haroj estis tute blankaj; sed lia barbo estis ankoraŭ preskaŭ nigra. Li karesis katon boliĝintan sur siaj genuoj, kaj ŝajnis ne atenti pri mi. Mi faris la rondiron de la ruinoj, kies parto estis kovrita kaj fermita per branĉoj, pajlo, herboj kaj ŝtonetoj, estis loĝata de la solulo, kaj mi ĝiaflanken revenis.

De tiu loko, la vidado estas admirinda. Dekstre, estas Esterel, strange neregula, kun siaj pintaj kulminoj, poste la senmezura maro, kiu etendiĝas ĝis la malproksimaj Italiaj marbordoj, kun siaj multaj kaboj, kaj kontraŭrigarde al Cannes, la insuloj de Lérins, verdaj kaj plataj, kiuj ŝajnas flosi, kaj la lasta prezentas al la marvasto altan kaj malnovan fuorton kun krenelaj turoj, konstruitan en la ondoj mem.

Poste, superante la verdan morbordon, kie de tiel malproksime, oni vidas, similaj al nenombreblaj ovoj ovellasitaj laŭlonge de la marbordo, la longan sinsekvon de vilaoj kaj blankaj urboj konstruitaj en la arboj, stariĝas Alpoj, kies kulminoj estas ankoraŭ kapuĉitaj de neĝo. Mi murmuris:

– Kiom, tio belas!

La viro levis la kapon, kaj diris:

– Jes, sed kiam oni vidas tion dum la tuta tago, tio estas monotona.

Do li parolis, li babilis kaj li enuis, mia solulo.

Li estis en mia povo.

Tiun tagon mi ne restis longtempe, kaj mi nur strebis malkovri la koloron de lia

mizantropo. Li precipe impresis min kiel estulo laca de la aliaj, laca pri ĉio, definitive senluziigata, kaj naŭzata pri li mem, kiel la cetero.

Mi forlasis lin, post mi paroladis dum unu duonhoron kun li. Sed mi revenis post ok tagoj, kaj ankoraŭ unufoje la sekvantan semajnon, poste ĉiusemajne; tiel bone ke antaŭ du monatoj ni amikiĝis.

Nu, iun vesperon je la fino de majo, mi juĝis alveninta la momenton, kaj mi kunportis proviantojn por vespermanĝi kun li sur la monto de la Serpentoj.

Tio okazis dum iu el tiuj vesperoj en la Sudo, en tiu lando kie oni kultivas la florojn, kiel la tritikon en la Nordo, en tiu lando, kie oni produktas preskaŭ ĉiujn esencojn, kiuj parfumas la karnon kaj la robojn de la virinoj, iu el tiuj vesperoj, kiam la emanaĵoj de la nenombreblaj oranĝarboj, kies ĝardenoj kaj ĉiuj ondiĝoj de la valetoj estis plantitaj, sensemocias kaj langvoras ĝis revigi pri amo la maljunulojn.

Mia solulo akceptis min kun videbla ĝojo; li volonte konsentis partigi mian vespermanĝon. Mi trinkigis al li iom da vino, kies li perdis la kutimon; li vigliĝis, kaj ekparolis pri sia pasinta vivo. Li ĉiam loĝis en Parizo, kaj vivis kiel gaja fraŭlo, ŝajnis al mi.

Mi bruske demandis al li:

– Kia stranga ideo vi havis, pro ke vi venis alte stariĝi sur tiu altaĵo?

Li tuj respondis:

– Ha! estas ke mi ricevis la plej akran skuon, kiun povas ricevi viro. Sed kial mi kaŝus al vi tiun malbenon? Ĝi kompatigos min, eble! Kaj poste... Mi neniam diris ĝin al neniu... Neniam... kaj mi ja volus scii... unufoje... tion, kion aliulo pensas pri tio ... kaj kiel li juĝas tion.

Naskiĝinte en Parizo, mi estis edukita, kreskis kaj vivis en tiu urbo. Miaj gepatroj lasis al mi plurajn milojn de frankoj kiel rento, kaj pro protekto, mi sukcesis obteni modestan

kaj trankvilan postenon, kiu faris min riĉa, por iu fraŭlo.

Mi travivis, jam de mia adoleskeco, kiel senbrida fraŭlo. Vi scias tion, kio estas. Libera kaj sen familio, rezoluta tute ne preni laŭleĝulinon, mi vivis jen tri monatojn kun iu, jen ses monatojn kun alia, poste unu jaron sen kunulino, rikoltetante sur la amaso de la liberaj knabinoj aŭ la ĉiesulinoj.

Tiu duonbona ekzistado, kaj eĉ banala, se vi volas, taŭgis al mi, kontentigis miajn naturajn gustojn pri ŝanĝiĝo kaj gapado. Mi vivis sur la bulvaldo, en la teatroj kaj la trinkejoj, ĉiam ekstere, preskaŭ sen hejmo, kvankam mi dece loĝis. Mi estis unu el tiuj miloj de estuloj, kiuj sin lasas flosi en la vivado, kiel ŝtopiloj; al kiuj la Parizaj muroj estas la muroj de la mondo, kaj kiuj zorgas pri nenio, pasiiĝante pri nenio. Mi estis tiu, kiun oni nomas bonan knabon, havante nek kvalitojn, kaj nek difektojn. Jen. Kaj mi ekzakte taksas min.

Do, de dudek ĝis kvardek jaroj, mia ekzistado fluis malrapide kaj rapide, nenia karakteriza evento spuris ĝin. Kiel rapidas la monotonaj Parizaj jaroj, kiam nenio el tiuj memoraĵoj, kiuj gravas, eniras en la spiriton; tiuj longaj kaj kunpremitaj jaroj, banalaj kaj gajaj, kiam oni trinkas, manĝas kaj ridas, ne sciante kial, kun la lipoj etenditaj al ĉio, kio estas gustebla, kaj al ĉiu, kiu estas kisebla, inkliniĝante al nenio. Mi estis juna; mi fariĝas maljuna, nenion farante pri kio faras la aliaj; mi havas nenan interrilaton, nenan radikon, nenan ligilon, mi vivis preskaŭ sen amikoj, sen parenco, sen edzino, sen infanoj!

Do, milde kaj rapide mi baldaŭ fariĝis kvardekjarulo; kaj por festi tiun datrevenon, mi regalis min, tute sola, per bona vespermanĝo en granda restoracio. Ĉar mi estis sola en la mondo; mi trovis plaĉa, sole festi tiun daton.

Post la vespermanĝo, mi hezitis pri kio mi tuj faros. Mi emis eniri en teatron; kaj

poste la ideo alvenis al mi, ke mi pilgrimu al la Latina Kwartelo, kie antaŭe mi faris miajn studojn pri juro. Do mi trairi Parizon, kaj mi eniris, sen antaŭpenso, en iun el tiuj biertrinkejoj, kie estas knabinoj, kiuj servas vin.

La kelnerino, kiu prizorgis mian tablon estis tute juna, bela kaj ridema. Mi proponis al ŝi trinkaĵon, kiun ŝi tuj akceptis. Ŝi sidiĝis vidalvide al mi, kaj atente rigardis al mi per sia ekzercita okulo, ne sciante kun ia speco de masklo ŝi rilatis. Ŝi estis blonda, aŭ prefere blondhara, iu malhipokrita, tute malkaŝema kretilino, kiun oni divenis roza kaj graspujeta sub la ŝvelita ŝtofo de la korsaĵo. Mi diris al ŝi la galantajn kaj stultajn aĵojn, kiujn ĉiam oni diras al tiuj estaĵinoj; kaj ĉar ŝi estis vere ĉarma, subite la ideo alvenis al mi, ke mi forkonduku ŝin... ĉiam por festi mian kvardekjaraĝon. La afero estis nek longa, kaj nek malfacila. Si estis libera... de antaŭ du semajnoj, ŝi diris al mi... kaj ŝi unue konsentis veni kun mi vespermanĝi en la Halles, kiam ŝia deĵoro estos finiĝinta.

Ĉar mi timis, ke ŝi diskrete pafu sin for – neniam oni scias, kio povas okazi, kiu povas eniri en tiujn biertrinkejojn, kia vento povas blovi en virinan kapon – mi restadis tie, dum la tuta vespero, atendante ŝin.

Mi ankaŭ estis libera, de antaŭ unu aŭ du monatoj, kaj mi demandis al mi, rigardante tiun ĉarman debutantinon de la amo, kiu iris de tablo al tablo, se mi ne bone efikus kontrakti kun ŝi por kelka tempo. Tie, mi rakontas al vi unu el tiuj vulgaraj ĉiutagaj aventuroj de la vivo de la Parizaj viroj.

Pardonu al mi tiujn krudajn detalojn; sed tiuj, kiuj ne poete amis, prenas kaj elektas la virinojn, kiel oni elektas kotleton ĉe la viandisto, ne prizorgante alian aferon, ol la kvaliton de ilia karno.

Do, mi forkondukis ŝin al ŝia hejmo; ĉar mi respektas miajn littukojn. Temis pri malgranda laborista loĝejo, pura kaj malluksa,

je la kvina etaĝo, kaj tie mi travivis du ĉarmajn horojn. Tiu etulino estis el maloftaj gracieco kaj afableco.

Dum mi estis forironta, mi alproksimiĝis al la kameno, por tie demetis la laŭregulan donacon, post difinite duan intervidiĝon kun la knabino, kiu restadis en la lito. Mi konfuze vidis subgloban horloĝon, du florzvojn, kaj du fotografaĵojn, el kiuj unu estis tre malnova, iu el tiuj fotoprovajoj sur vitro, nomataj dagerotipoj. Mi hazarde kliniĝis al tiu portreto, kaj mi restis tute konfuzata, tro surprizata por kompreni... Estis mia portreto, la unua de miaj portretoj... kiun mi farigis antaŭe, kiam mi vivis kiel studento en la Latina Kwartelo.

Mi bruske ekkaptis ĝin, por ke mi ekzameni ĝin pli proksime. Mi tute ne eraris... kaj mi inklinis ridi, tiom la afero ŝajnis al mi neatendita kaj komika. Mi demandis:

– Kiu estas tiu sinjoro?

Ŝi respondis:

– Li estas mia patro, kiun mi ne konis. Patrino lasis tiun portreton al mi, dirante al mi, ke mi konservas ĝin, ke iam ĝi eble utiligos al mi...

Ŝi hezitis, ekridis, kaj reparolis:

– Vere, mi ne scias pri kio. Mi ne pensas, ke li venu leĝigi min.

Mia koro haste batis, kiel la galopo de elbridiĝanta ĉevalo. Mi kuŝrelokis la bildon sur la kameno, mi metis sur ĝi, ne eĉ sciante kion mi faris, du biletojn de cent frankoj, kiujn mi enpoŝe havis, kaj mi forkuris kriante:

– Ĝis baldaŭ... ĝis revido... karulino mia... ĝis revido.

Mi aŭdis, ke ŝi respondis:

– Ĝis mardo.

Mi estis en la malluma ŝtuparo, kiun mi blindopalpe malsupreniris.

Kiam mi troviĝis ekstere, mi ekvidis ke pluvis, kaj mi grandpaŝe foriris, tra ajna strato.

Mi iris antaŭen, frenezigata, konfuzegata, serĉante memori pri tio! Ĉu tio eblas? – Jes. –

